


ROK XXV.
STYCZEŃ
N-r 1.




JARO XXV
JANUARO
N-o 1.

EL POLLANDAJ VIDINDAJOJ.



Fragmento el la famkonata salminejo en WIELICZKA (Vjelička).
Kapelo de S-ta Antono en la subteraĵo, tute skulptita en salo.

Biblioteka Jagiellońska



1002376578

ESPERANTYSTA POLSKI
POLA ESPERANTISTO

WYDAWCY: POLA ESPERANTISTA KLUBO &
ELDONANTOJ: SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES REDAKCJI I ADMINISTRACJI: KRAKÓW, ul. LUBICZ 34

REDAKTORZY PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTOJ
TADEUSZ HODAKOWSKI

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8.—, półrocznie Zł. 4.—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem) roczna prenumerata Zł. 6.—.

ABONO: jare Zł. 8.—, duonjare 4.—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6.—
Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0.70 Aparta numero.

KATALOG

SEKCJI WYDAWNICZEJ POLSKIEGO AKADEMICKIEGO TOWARZYSTWA
ESPERANTYSTÓW — WARSZAWA, LESZNO 99. m. 5. — TEL. 798-37.

Baghy — Pilgrimo	3.20
Baliński — La lasta kravato de Aleksy	0.40
Balucki — Kuzeto (trad. Grenkamp)	0.60
Barwna pocztówka — grób Dra Zamenhola	0.30
Cart — Pri landnomoj	0.70
Czubryński — Esperantyzm	3.00
El polaj Kristnaskaj kantoj (kun muziknotoj)	0.30
Frenkiel — Verdaj fajreroj	1.00
Grabowski — El parnaso de popoloj	6.00
Grenkamp — Krijo de l' koro	0.50
„Koro” — muziknotoj de foxtrott-black-bottom kun vortoj de R. Schwartz	3.00
Korolenko — Arbaro bruas	1.60
Kraków — Gvidlibro	1.00
Kronenberg — Samouczek języka Esperanto	1.20
La granda monato de Esperanto	0.50
La Prauloj. La Wagram-Odo. La infano. (hungara novelaro)	0.60
Liem Tiong Hie — Javaj legendoj kaj fabloj	2.00
Mickiewicz — Sinjoro Tadeo (trad. Grabowski)	8.00
— Improvizacio de Konrad (trad. Grabowski)	0.50
Niemojewski — Legendoj (trad. Kuhl)	3.20
Poemaro el Hungarlando (trad. Szilágyi)	4.80
Penseroj (kolektita de Grenkamp)	0.75
Petőfi — Elektitaj poemoj	1.60
Pfeffer — Esperanto w 10 lekcjach wg. Carta i Borela	1.20
Pollando kaj Gdańsk (ilustrita gvidlibro)	1.50
Schwartz — Modernaj Robinzonoj	3.00
Sentis — Urso. En montoj	2.20
Turno — Podręcznik języka Esperanto	1.25
Trochimowski — Kwestja języka międzynarodowego	0.10
Universala Unuiĝo	3.40
Vortoj de prof. Cart	5.00
Wysłouch — El la lando de ruinoj	0.40
Zawada — Pełny podstawowy słownik jęz. Esperanto	4.00

Książki wysyłamy po otrzymaniu pieniędzy. Na wysyłkę doliczamy 20%, przy zamówieniu do zł. 6.— Przy wyższym — tylko 10%. Za przesyłkę poleconą doliczamy ponadto zł. 0.50. Za przesyłkę niepoleconą nie odpowiadamy. Zamówień za zaliczeniem nie przyjmujemy.

Przyjmujemy prenumeratę „Polskiego Esperantysty”. Rocznie zł. 8.—

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO
KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE
I ZAGRANICĄ.

ROK XXV JARO

KRAKÓW
STYCZEŃ 1931 JANUARO

Nr 1 N-o

REALIGITA PENSO.

125

La penso, kiun mi jestis tri monatojn antaŭe por via bonvola konsidero jam realiĝis. La proponita de mi revuo pollingva por propagando de esperanto aperos post kelkaj tagoj. Tiun agon ebligis al ni favora sinteno de multaj samideanoj, kiuj laŭdaprobis la proponon kaj antaŭmendis multajn ekzemplerojn, esperigante nin, ke la revuo ne estos mallongdaŭra efemerido, sed ĝi vivados longe.

Tamen nuntempe ni ne havas ankoraŭ plenan garantion de longviveco, ni posedas nur fortan esperon kaj varman deziron, ke la revuo vivadu kaj vaste diskonigadu nian ideon.

Kion vi devas fari, karaj Gesamideanoj, por tion ebligi? Kompreneble, la revuo ne estos por ni, kiuj surprenis la taskon de redaktado, iel donanta monprofiton. Ni volas nur kovri la kostojn de presado kaj dissendado, la laboro, kiun ni donos, estos nur elkora donaco sur altaron de la ideo.

Ni petas vin, ni pretendas de vi nur varbadon de abonantoj por la revuo, la artikolojn, kiujn vi trovos en la gazeto, represigadu en la pola ĵurnalaro, por ke la peno, kiun eligis la verkintoj de la artikoloj, estu kiel eble plej efika. Laŭ nia scio la pola gazetaro nombras ĉ. 800 ĝis 1000 ĵurnalojn, do la sama artikolo, tre facile povus eĉ en kelkdekoj da revuoj reaperi, antaŭ ol ĝi fariĝos sufiĉe konata.

Ĉiu gazeto devas ricevadi la artikolojn en sia propra saŭco preparitajn. Aliajn artikolojn bezonos literatura gazeto, aliajn naciopolitika, kaj ree aliajn ia por profesiuloj ktp. Oni devas ĉiam esperanto-problemon konsideri laŭ tiu vidpunkto, kiun ŝatas aŭ pri kiu interesiĝas respektiva medio.

Ni volas, ke nia revuo estu tiu centro, kiu diskonigadus plej taŭgajn informojn por la propagando de esperanto. Tial krom la varbado de la abonantoj ni bezonas ankaŭ bonajn artikolojn, skribitajn de pollingvanoj pole, de alilingvanoj en esperanto, kaj de ni poste tradukotajn. Ni ne volas esti redaktantoj de la revuo, sed prefere „laŭvicigantoj“ aŭ „ordigantoj“. La redaktantoj estu vi, Gesamideanoj, kaj havu la gazeton tian, kian vi deziras.

La nomoj de s-ro dro Maksymiljan Ziomek kaj mia modesta, kiel tiuj de redaktantoj, estu tiaj nur laŭnome, por ekstero, ĉar en viajn manojn ni enmetas la direktilon. Ni plenumos viajn dezirojn, kondiĉe..., ke vi propagandos, varbados ktp.

Depost nuna momento manku en neniu loko, atendejo, legejo, kafejo, restoracio, manĝejo ktp. ktp. la pollingva revuo por la propagando de esperanto. La kongreso proksimiĝas, ni devas esti bone preparitaj, la socio devas scii, kion celas, kion postulas la tutmonda esperantistaro. Dissendadu la revuon al infiuhavaj personoj, al viaj konatoj, kiujn vi volas esperantistigi, al lernejoj, diversaj societoj, institucioj ktp. aŭ, se vi tion ne volas fari, komisiu la dissendadon al ni, ni volonte tion plenumas, sed pagu por ili la abonon aŭ varbu ilin kiel abonantojn. Pripensu: unu numero kostas ridinde malaltan sumeton, ĉar nur 20 groŝojn. Ĉu ĉiu esperantisto en Pollando ne povus mendi por si kaj siaj konatoj neesperantistoj **meznombro** 5 ekzemplerojn monate? Jam nun troviĝis kelkaj, kiuj postulis po 50 ekz. monate. Du mendis po 100. Jen imitinduloj!

Sed, pro Dio, mi petas ne sendu al ni ĉiu monate po 20 gr., kiel abonprezon por unu numero. Vi sendas 20 groŝojn kaj ni ricevas nur 15, ĉar la Poŝtsparkaso deprenas de ĉiu menseŝado manipulan pagon de 5 gr. Troviĝis tia samideano. Ni kredas, ke li estas tre honkora, sed ĉe tia laborsistemo, ni certe bankrotus, ĉar la prezo de 20 gr. estas nur niaj propraj kostoj, se ni ricevos 15, ni devas alpagi. El kie?

Por tion eviti, ni decidus, ke minimuma enpago estu 60 gr. kiel abonprezo de po unu ekzemplero monate dum unu kvaronjaro.

La unuan numeron de la revuo ni dissendos grandnombre por ĝin diskonigi. Ĉiu nuntempa abonanto de Pola Esperantisto, pri kiu ni opinias, ke li konas polan lingvon kaj povos disvendi la propagandan revuon, ricevos po 3 ekzempleroj de pollingva revuo. La eksabonantoj de P. E. kaj aliaj personoj, kies adresojn ni konas, ricevos po unu ekzemplero kun invito pri abono.

Sed Samideanoj, ni petas vin, ne limigu vin al tiuj tri numeroj, tio estas nur minimuma kvanto, kiun vi disvendu, kaj la pagon sendu al ni per la poŝtĉeko.

Ĉiu kursgvidanto memoru, ke lia sankta devo estas informi la kursanojn pri nia movado. Li tre facile povos tion fari, abonigante la kursanojn.

Se vi aranĝas publikan varbvesperon, mendu antaŭe ĉe ni bezonatan kvanton da ekzempleroj. Sendube vi sukcesos disvendi ilin kaj krome multajn ĉeestantojn vi abonigos.

Pro teknikaj malhelpoj ni ne povis precize, laŭ la antaŭdirita dato, aperigi la revuon, tamen dum unu-du monatoj ni volas tiel ĝustigi la aperdaton, ke vi jam unuataĝe de ĉiu monato havu en viaj manoj la gazeton, por ke ĝi validu, laŭ la dato dum la tuta koncerna monato.

Fine mi diru kiel ni nomis la revuon. Post longa diskuto kun ĉi-tieaj gravuloj esperantistaj ni elektis la titolon: „**Pomocniczy Język Światowy**“ (Helpa Mondlingvo). El ekster Kraków ni ricevis kelkajn projektojn, je kiuj tamen ni ne povis konsenti.

Tadeusz Hodakowski.

INTERVJUO KUN BIAŁYSTOKA VOJEVODO PRI ESPERANTO.

Zamenhofa Esperanto-Societo en la naskurbo de nia Majstro, Białystok organizas nun Internacian Postkongreson Esperantistan okazontan tuj post la XXIII-a Universala Kongreso Esperantista en aŭgusto 1931 j. Samtempe estas komencitaj preparaj laboroj por starigo de monumento al la Majstro, solene malkovrota dum la Postkongreso.

Honoran protekton de la Postkongreso kaj de konstruo de monumento Zamenhofa transprenis Białystoka vojevodo s-ro Marjan Zyndram-Kościałkowski.

La vojevodo donis al la membro de Internacia Gazetara Komisiono, komisiita de Internacia Centra Komitato de la Esperanta Movado kaj ĉefdelegito de UEA s-ro J. Szapiro en Białystok sekvantan intervjuon:

— La fakto, ke vi, sinjoro vojevodo, — komencis la intervjuanto — akceptis la honoran protekton de nia Postkongreso kaj de la konstruo de Zamenhofa monumento, estas por ni, Esperantistoj, nova pruvo de la simpatio, konstante montrata de la Pola Registaro kaj de ĝiaj reprezentantoj al la Esperanta movado. Ĉu vi, sinjoro vojevodo, estus afabla diri vian opinion pri la Esperanta movado ĝenerale, kaj en Polujo, la Zamenhofa patrujo, precipe?

— Tre volonte. Mi opinias, ke akcepto de artefarita lingvo, kia estas Esperanto, estas la sola racia solvo de la urĝanta afero de internacia helplingvo. Elekto de iu ajn lingvo nacia por la rolo de internacia donus al la koncerna popolo ne nur kulturan, sed grandparte ankaŭ politikan superregadon de la mondo, kio kompreneble estas neallasebla pro la rajto de ĉiu popolo al libera disvolviĝo kultura kaj al egalrajteco en la granda familio de popoloj, sed estas perfekta interkomprenigilo por ĉiuj popoloj de la tuta mondo, ebliganta reciprokajn alproksimiĝon kaj ekkonon de la apartaj naciaj kulturoj.

Polujo rajte fieras pro sia rolo de historia patrujo de Esperanto. Nia granda civitano, bjalistokano Zamenhof disfamigis sian naskurbon Białystok kaj sian patrujon Polujon tra la tuta terĝlobo. Jam, en la tempo de mallibereco de nia patruja lando la plej bonaj verkoj de pola literaturo estis konatigitaj al ĉiuj grandaj kaj malgrandaj popoloj dank' al la tradukoj Esperantaj.

Plej multe imponis min informo, tralegita siatempe en gazetoj, ke „Marta“ de Orzeszko estis eĉ de la Zamenhofa Esperanta traduko pluen tradukita japanlingven.

— Kiel vi, — sinjoro vojevodo, pritaksas la signifon de Esperanto por la aktuala nun en Polujo demando de turisma propagando?

— Sendube uzado de Esperanta lingvo por la celoj de turisma propagando estas tre racia. Turismaj presajoj en tiu lingvo plenumas sian varbrolon ĉie, ĉar ili ja ne konas lingvajn limojn, dividantajn per fina muro ne nur la apartajn landojn, sed eĉ iliajn partojn. Mi atende trarigardis la esperantlingvajn turismajn presajojn, kiujn vi, sinjoro redaktoro, prezentis al mi kaj estas mirigita pro la sufiĉe ampleksa apliko de Esperanto eksterlande por turisma propagando.

La agado de Universala Esperanto-Asocio, celanta i. a. ke ĉiuj landoj, provincoj kaj lokoj vizitindaj aperigu esperantlingve siajn priskribojn, meritas laŭ mia opinio plej grandan laŭdaprobon.

Polaj Esperantistoj interkonsente kun niaj landkonemaj kaj turismaj organizadoj devas siaflanke per helpo de Esperanto konigi al eksterlando niajn belegajn pejzaĝojn kaj rimarkindajn historiajn antikvaĵojn de Polujo, ĝis nun bedaŭrinde tre malmulte konatajn eksterlande.

La eksterlandaj gastoj, venontaj en aŭgusto de sekvonta jaro al la Universala Kongreso en Krakovo kaj al la Postkongreso kun malkovro de Zamenhova Monumento en Białystok, povas esti certaj, ke Polujo akceptos ilin kun la konata pola gastameco kaj ke pri la restado en nia patrujo ili konservos agrablajn rememorojn.

Fine mi havas la plezuron konstati, ke mi konas persone la Prezidanton de Pola Esperanta Delegitaro prof. O. Bujvid, kiun mi lernis ŝati kaj estimi, kiel tre merititan civitanon de nia lando.

(Int. Gazetara Komisiono, kom. de I. C. K.)

LA TRIUMFO DE L' ALKOHOLO.

Mi nomas min alkoholo! Mia reĝolando estas la tuta mondo. Kiu egaligis min? Kiu estas tiel forta kaj potenca kiel mi? Mi estas reĝo super la reĝoj, potenculo super la potenculoj. Mia fortego estas neelĉerpebla, mia aŭtoritato senlima. Mi estas venkinta kaj eksterminta tutajn naciojn, mi entute detruis centfoje pli ol milito, malsato kaj brulegoj. Mi havas ja tutajn legiojn de adeptoj kaj adorantoj.

Mi nomas min — alkoholo! Kiu egaligis min, kiu? Milojn da animoj mi jam ruinigis kaj pereigis. Mi ŝirmas nenian socitavolon kaj nenian aŭtoritaton. Mi gardas nenian aĝon kaj nenian sekson. Kiun mi ekkaptos, tiun mi malsuprentiras en kotajon, ĉu ĉi tiu estas riĉulo, ĉu almuzulo.

Mi nomas min — alkoholo! Al junulo mi elŝiras la sanon, al virgulino la honoron, al viro la forton kaj al virino la honton. Mi faras el homo ŝteliston, falsejuriston, perfidulon kaj eĉ mortiginton. Miaj adorantoj kaj subuloj turmentadas senkompate siajn edzinojn kaj infanojn, ili suprenigadas manojn kontraŭ siaj patroj kaj patrinoj. Ekzistas neniam ordonoj diaj kaj leĝoj homaj, kiujn ili ĉiutage petole ne trapaŝus kaj ne surpaŝus.

Mi loĝatigas ne nur malliberejojn, sed ankaŭ frenezulejojn, malsanulejojn kaj azilojn. Kio estas ĉiuj krueluloj kompare al mi? Mi estas pli terurega ol barbara Nerono, pli potenca ol milito kaj pesto. Mi estas kiel idolo Moloĥo, al kiu oni oferas volonte honoron kaj havaĵojn, edzinon kaj infanojn, korpon kaj animon. En mia regno la suno estas neniam subiranta. Mia potenco estas nemezurebla kaj mia regado severa kaj tirana.

Kiam mi estis eltrovita, oni imagis, ke aperis la fluidaĵo de la vivo, kaj jen mi estas nur trinkaĵo de la morto kaj de grandega malfeliĉo por ĉiuj popoloj. Mi promesas plifortigi, ĝojigi la animon — kaj

mi senkonsciigas kaj deprimas ĝin; mi promesas kontentecon kaj ĝojecon — kaj anstataŭ tio mi kaŭzas interbatigojn, kruelaĵojn kaj perfortojn.

Dum ĥolerepidemio oni elstarigis min kiel certiga profilaktajo, sed eĉ tiam mi trompis la esperon kaj la ĥolero ensorbis deĵoje pli da drinkuloj ol sobruoj. Mi vestas min en ĉarma vestajo, mi vojaĝas tra la mondo sub la bruaj nomoj kaj mi scias tikli kaj ĉarmi sentamon. Ekvidu nur diverskolorajn afiŝojn surgluitajn sur la urburoj kaj stratoj, ekrigardu anoncojn en ĉiutagaj gazetoj kaj ilustritaj ĵurnaloj, kiuj publikigas mian gloron — sed ĉio ĉi estas nur mensogo kaj perfido. Ekrimarku orbrilajn kaj arĝentkolorajn surskribajojn sur boteloj, ekrimarku multekostan fluaĵon en pokaloj, kiel ĝi brilas kaj ŝaŭmas — sed ĉio ĉi estas nur mensogo kaj perfido. Mi promesas la korpon varmigi aŭ malvarmigi, nervojn eksciti aŭ kvietigi, doni trankvilon kaj forgeson — sed ĉio ĉi estas nur mensogo kaj perfido!

Rigardu, jen en la foso kuŝas homo. Lia familio atendas lin jam longe, li promesis al ĝi iri hodiaŭ post la laboro direktejmen, ĉar unu el liaj infanoj estas malsana kaj luktas kun la morto. Sed mi lin ne lasis kaj mi paroletis nur en lian oreton: iru kun mi iom amuziĝi, trinku nur unu ĝlaseton, vi havas ja dome ĉagrenon — kaj kiam li obeis min, li jam apartenis al mi. Kiam li vekigis kaj hejmvrenis, lia infano estis jam mortinta.

Ĉu vi vidas tie ĝendarmon kaj kondukatan tra la stratoj krimulon? Li mortigis sian kamaradon ĝuste ĉe botelo da brando, ĉar ili ambaŭ intermalpaciĝis ĉe kartludo. Ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Rigardu ĉi tiun infaneton kuŝantan sur mizera tabullito kaj suferantan je konvulsio — ĝia vivo estas venenita jam de unuaj tagoj, ĉar ĝiaj ĝepatroj estas miaj subuloj kaj sklavo. Ĉi tio estas ankaŭ mia afero.

Observu tiujn ŝanceliĝemajn personojn kun besta vizaĝo kaj salivaj lipoj, kun okuloj sangumitaj — ĉiuj ili estas miaj sklavo, drinkuloj. En malmola servo ili estas ĉe mi. Ĝis sango mi vipas kaj turmentas ilin. Ilia ekscitita sango kuris kiel fajro tra la vejnoj, sed ili devas ĉiam trinki kaj ekbruligi ĉi tiun internan fajron, inferan fajron. Mi vestas ilin en ĉifonajojn, iliajn infanojn mi suferigas per malsato, mi pagas al ili per eterna morto, sed ili ne ĉesas trinki.

Kaj kiu kuraĝus difekti mian potencon, kiu estus kapabla liberigi miajn sklavojn? Ĉu scienco kaj klerigo? Montru al homoj en kiel eble plej nigraj koloroj la danĝerojn, minacantajn al ĉiuj, kiuj uzadas alkoholon. Konfirmu viajn konkludojn per klaraj ciferoj, indiku, ke laŭ sperto kaj statistiko je ĉiu cento da memmortigoj kaj je ĉiu cento da frenezuloj venas po 70 drinkuloj, ke en cento da diversaj krimoj — 75 sub influo de alkoholaj ĝlasetoj efektiviĝas, ke multe pli frue ol fizikan vivon, mi ruinigas eksenton de devo, honto kaj respondeco. Kia rezultato de ĉi tio? Jen en plej bona okazo kelkaj malfidelaj drinkuloj pripensos la aferon kaj forjetos la ĝlaseton je semajno, monato, jaro — pli malofte je ĉiam. Aliaj restas fidelaj al mi!

Mi kondukas miajn sklavojn al perejo kaj kondamno. Demandu ilin, kiom foje intencis komenci la novan vivon, kiam ili estis vekigintaj matene post fordrinkita nokto kun malplena kapo, kun rigidaj,

vundetitaj malpezaj membroj, kun disŝiritaj kaj malpurigitaj vestoj kaj kun senmonigita poŝo; kaj kiam ili denove perlaboris la monon ili ree apartenis al mi. Mi helpas al ili forgesi la bonajn intencojn. Oni vokas kontraŭ mi policistaron kaj ŝtatan leĝdonon, kvazaŭ mi timus tiajn decidojn. Tuŝu min nur iu ajn — kaj senprokraste ekstaras je mia defendo miloj da batalantoj, en unua vico grandaj taĉmentoj da brand- kaj bierfaristoj, drinkejestroj, restoraciistoj kaj drink-industriistoj, kiuj per sia veplendo plenigadas la tutan mondon.

Laŭvere — neniu en la mondo posedas tiom da amikoj sindonaj, kiel mi. Tial mia potenco estas grandega, mia regado nevenkebla. Mi ruinigis jam milionojn — kaj mi ruinigos ankoraŭ pli multe. Mi estas dio ĉiopova, la plej minaca malamiko de la vivo, la plej monstra kaj terurega tirano.

Mi nomas min — alkoholo!!!

Prof. Sygnarski — Bydgoszcz, Polujo.

KAZIMIERZ TETMAJER.

„LA TATRA MUZIKANTO”.

(Montarana rakonto)

En unu el plej ĉarmaj provincoj de Polujo, en ĉirkaŭaĵo de la montoj Tatroj, loĝas montaranoj, homoj vivantaj en la plej proksima kontakto kun kruda, praa naturo de la tero. Jam la geografia situo mem, krutaj abruptaĵoj, potencaj rokaj fendegoj, ŝirkurantaj torrentoj influas la apartan karakteron de la montaranoj. Ili konservis ne nur proprajn al si, kolorriĉajn, tradiciajn popolkostumojn, sed ankaŭ unu el plej belaj polaj idiomoj. Ilia parolo estas tiel bela kaj pura, kiel la monta aero, kiun ili spiras. El la montaranoj rekrutiĝas ofte la plej valoraj civitanoj, inter kiuj ne mankas pentristoj kaj famaj poetoj. La mondo de legendoj, vive enstantaj en koroj kaj mensoj de la ĉetatra popolo ne unu foje estis fonto de inspiro por verkantoj en pentrarto, muziko aŭ poezio.

Mortis la maljuna Zwyrta kaj lia animo iris al la ĉielo kune kun la lipharoj sur la vizaĝo kaj la violono sub la brako.

Li rigardis: fermite.

Pensis do: ne frapu al la pordo, ĉar oni dormas. Li sidiĝis apud la pordego, sed baldaŭ eksentis enuon, prenis do la violonon elsub la brako, alpremis per la dentoj la kordostreĉilojn, ekprovis la kordojn, apogis la violonon je la brako, ŝovis la arĉon. Komence mallalte, ĉar li timis veki, sed iom poste alpremis pli forte. Kaj ludante li rememoris la edzinon, kiu restis sur la tero, kaj rememoriginte ŝin tuj ekkantis:

„Kien mi min turnus, ĉie la edzino...”

Ekkantinte laŭte li aŭdis malantaŭ la pordo:

— Kiu do?

— Sankta Petro — ekpensis Zwyrta sed respondis kuraĝe:

— Mi!

— Kia „mi”?

— Zwyrta.

— Kial ci bruas?

— Mi neniel bruas, sed kantas.

— Krevu pro tia kantado. De kie ci?

— De la montoj.

- De Nowy Targ?
 — Jes.
 — Kaj el kiu vilaĝo?
 — E, se mi eĉ dirus, vi ne scius. Kion vi konas ĉi tie.
 — Mi ĉion konas. El kie?
 — El Mur.
 — Cia nomo?
 — Mardula Maĉjo.
 — Kaj alnomo?
 — Zwyr тала.
 — Nu do atendu tie, ĝis estos tago. Sed ne faru bruon.
 — Mi ne faros. Havu bonan nokton.
 — Nu, nu! Do kviete!

Sidis iun tempon kviete Maĉjo Zwyr тала, sed frumatene estis iom malvarme, kvankam ĝi estis somero; denove li ekludetis la violonon.

Kaj jen iuj kapetoj, unu, dua, tria super la pordego.

Anĝeletoj.

— Vidu, vidu — diris unu — kiel li bele ludas.

Kiam Zwyr тала tion aŭdis, tuj traŝovis la arĉon sur la kordoj, tuj ekludis sur ĉiuj kvar la „marŝon“:

„Madjaro trinkas, Madjaro pagas...“

— Aĥ! Kiel bele! Kiel ĉarme! — ekkriis la anĝeletoj. — Kia ĝi estas muziko?

— Ĝi estas „La rabista“.

— Aĥ rabista, aĥ rabista! — komencis krei la anĝeletoj kaj manplaŭdis. — Aĥ! kiel ĝi estas bela.

Subite la ŝlosilo ekgrincis en la seruro, la pordo malfermiĝis; la ĉiela pordisto, Sankta Petro, aperis:

— Zwyr тала!

— Jen!

— Venu!

Tuj disfamiĝis en la ĉielo, ke venis montarano, kiu ludas. Do la Sanktuloj, Sanktulinoj, anĝeloj petis Zwyr тала'n: Ludu, ludu! Ĉu vi scias kanti?

Kaj Zwyr тала ne respondis, sed tuj laŭ la montarana melodio:

„Kiam mi ekkantas sur Tatra herbejo,

Kvazaŭ tion ludus orgen', en preĝejo...“

kaj ĉiuj laŭdis: Aĥ! Kiel bele! Aĥ! kiel ĉarme!...

Do Zwyr тала ludis, kantis, nu kaj kio okazis.

Iris Sankta Jozefo tra la ĉielo kaj jen aŭdis animon kantantan iun knabinan animon:

„Apenaŭ mi havis aĝon dekdujaran...“

Aŭskultis Sankta Jozefo: ankoraŭ tiu ne finis, jam en alia flanko iu vira animo base:

„Frapu, Dio, forte tiun ŝafpaŝiston...“

Sankta Jozefo kaptis sin je la kapo! — Ja — li diris — kio ĝi estas?!

Li kuris al Sankta Petro kaj jen en tiu loko, kie la savitaj animoj devas lerni la anĝelajn kantojn, ne ĉefanĝelo Gabrielo kun-

ora dirigilo kaj trumpeto staris, sed Zwyrtala sur la seĝo sidis kaj ludis kaj ĉirkaŭ li animoj viraj, virinaj kaj anĝeloj jam sufiĉe lerte fiore:

„Venu jam hejmen — nokt' malhela...”

— Sinjor' Jezu' Kristo! — ekkriis Sankta Jozefo — kio do okazas?!

Venis al li ĉefanĝelo Gabrielo kaj diris, ke neniŭ volas en la ĉielo alie kanti, nur montarane. Eĉ sankta Cecilio.

— Zwyrtala ilin instruas — li diris — mirindaĵo okazas. Novajn kantojn ili estis lernontaj, morgaŭ festo de Dipatrino Flora, neniŭ ion konas!

Venis nokto, oni aŭskultis: de tie kaj de ĉie iras montarantaj melodioj, la tuta ĉielo bruas.

Matene diris Sankta Petro al ĉefanĝelo Gabrielo: Tiel ne povas esti. Ĉu vi ne alvokus tiun Zwyrtala'n?

— Bone. Tuj!

Iris Zwyrtala kun violon' sub la brako kaj kliniĝis salute.

— Zwyrtala! — diris Sankta Petro. — Ĉu ci ne irus aliloken?

— De tie ĉi?

— Jes.

— El la ĉielo?

— Jes.

— Kien do?

— Kien? — ripetis Sankta Petro. — Jen embaraso... — Kaj li enpensiĝis.

— Sed kial do? — demandis Zwyrtala. — Ja tien ĉi oni min sendis post la morto.

— Guste tial la embaraso...

— Mi ne ŝtelis, ne rabis, ne batis...

— Mi scias, scias!

— Nu do kial?

— Ĉar ĉiuj en la ĉielo montarane kantas, depost kiam ci venis!

— Eh! Do pro tio? — Ekpensis Zwyrtala iom, gratis sin sur la kapo kaj diris: — Eh, mi petas Vian Moŝton, ne kaprompu pro tio! Mi iros!

— Kien?

— Ja de kie mi venis.

— Sur la teron? Mi pensis sendi cin sur iun stelon.

— Mi ne volas. Neniajn stelojn vi serĉu! Mi iros tien, malsupren.

— El la ĉielo?

— E, mia sankta karulo, mi ankaŭ tie trovos la ĉielon! Mi vagados en arbaroj, sur valoj ludante; gardos, ke la malnovaj melodioj ne formortu. Sidos knabo kun violono ĉe la ŝafoj — mi ludos al li mallaŭte... Ekkantos knabino ĉe l' brutaro sur valo — mi helpos ŝin. Iros maljunaj mastroj en arbaron pinojn haki, mi zumos al ili ĉe l' oreloj, kiel niaj prapatroj ludadis. Kaj se estos neniŭ, tiam estos akvo en la torentoj, estos lagoj glaciigitaj, kie la vento fajfas, estos la arbaro; mi tie ne entos... Kiam mi vivis, ofte mi Disinjonon petis, ke Li permesu al mi post la morto eterne resti en la montovaloj.

Li salutkliniĝis ĝentile kaj foriris tra l' ĉiela pordego sur la vojon al la tero. Estis nokto. Tra la lakta vojo li iris malsupren port-

ante sub la brako la violonon kaj, kiam li sentis sin jam en libero, ekkriis: hu ha! kaj laŭte levis la kanton:

„Montaran' mi estas el Tatra montaro;

Pluveto min lavis, lulis la ventaro!

Kial, montoj, montras vi malgajan senton?

Ĉu per neĝo kovris vin malvarma vento?"

Kaj plue iris kantante Zwyrtala sur la lakta vojo malsupren, ĝis li atingis la montosuprojn kaj enprofundiĝis en Tatroj.

El la pola lingvo tradukis
Baroko.

KLARIGOJ. Nowy Targ — distrikta urbeto en la regiono de Tatroj. — Mur — nomo de vilaĝeto en Tatroj. — „La rabista“ — nun el la plej popularaj kant-kaj dancmelodioj de Tatraj vilaĝanoj. La enhavo de sekvantaj aliaj kantetoj cititaj en ĉi tiu novelo estas iom frivola — pro tio la kofuzo kaj indigno de l' sanktuloj. — Festo de Dipatrino Flora — la 15-an de aŭgusto.

EL LA GAZETARO.

Esperanto-Kiboŝa N-o 10 Decembro. Luksa eldonajo. Ni eŭropanoj povas envii ke Japanujo, fama Niponlando tiamaniere estas progresema. Sed la envio ne estas esperanta sento. Ni ĝojas vidante veran progreson de la genia ideo trans la oceanoj.

Jam 14.000 abonantoj. Kiu gazeto en niaj eŭropaj landoj havas tiom? La enhavo: Zamenhofa Tago kaj Festo de la Libro. Belega alvoko al la Majstro. Esperanta vojaĝo tra Eŭropo de samideano H. Iŝiguro: Białystok, Warszawa. Bedaŭride mi ankoraŭ ne konas japanan lingvon, mi treege dezirus legi ĝin. Belegaj fotografajoj el Oxforda Kongreso.

El la klarigo pri Kiboŝa ni ekscias, ke ĝi ekzistas jam 22 jarojn. Grandaj meritoj de s-ro Gotoo administranto kaj eldonejestro, kiu fondis 4 lernejojn kaj de post la kreo de Kiboŝa antaŭ 12 jaroj ĉiam laboras senlace por feliĉigi siajn samlandanojn. Lia devizo: kiu ne volas labori, ne havas la rajton postuli instruon, devas disvolviĝi en aliaj landoj.

Ni vidas ke la libreto estas destinita por la lernado. Oni rimarkas sciigojn pri fundamenta vortaro, pri sintakso, pri frazfarado. Estas recenzoj de multaj libroj kaj gazetoj. Memkompreneble Heroldo de Esperanto estas ĉe la unua honora loko.

POLLANDA KRONIKO.

BYDGOSZCZ. La loka Societo Esperanto organizis okaze de la 71-a datreveno de naskiĝo Zamenhofa festan akademion por la loka esperantistaro kaj simpatianoj de nia movado. La interesa programo ampleksis interalie deklamadojn, parolitajn de f-ino Ezopówna kaj gimnaziano Woźniewski. Lernantoj de la loka muzikkonservatorio ludis kvarteton de Haydn. La festparoladon pri vivo kaj verko de nia Majstro faris gimnazia prof. Sygnarski. Krome memorparolis la konata esperanto-verkisto Jean Forge-Fethke. La ĉambrego „Harmonja“ estis plenigita de publiko, oni rimarkis reprezentantojn de la gazetaro, profesoro, pastraro kaj blinduloj.

S-o prof. Sygnarski instruas esp-on en 3 lernejoj (Ŝtata Klasika Gimnazio, Komercesta Liceo, Urba Komercesta Lernejo). Krom tio li komencis esp.-kurson por plenaĵuloj.

LWÓW. Nia societo solene festis la naskotagon de la Majstro. La 14. XII. aranĝis s-o Schnützer festan akademion esperantan per radio. La programo konsistis el parolado de s-o Schnützer pri dro Zamenhof, deklamo de s-o Leopold K., esper. kantoj el la opero Halka, belege kantitaj de primadonna de Ivova opero f-ino Kitzner kaj ludo de himno „Espero“ kaj aliaj kantoj per „Rondo mand. serenada“. La 15. XII. okazis festa soleno en societejo. Post enkonduka parolado de dro Fels havis interesan prelegon f-ino Leonja Fruchtówna s. t. „Esperanto — plej granda progresigilo de l' homaro“. Poste deklamis sentplene f-ino Ŝapira kaj ĉarme dancis f-ineto Rosengarten. Per la himno „Espero“ kantita de ĉiuj ĉeestintaj esperantistoj, oni finis la belan vesperon.

La 4. I. prelegis per lvova radiostacio nia fervora samid. s-o Sobolta s. t. „Impresoj de blinda esperantisto dum eksterlanda vojaĝo“, propagandante varme por nia ideo kaj esper. movado kiel ankaŭ por la okazonta kongreso en Kraków.

LOMZA. La 29-an de novembro okazis en la salono de „Hasomir“ solena akademio pro la unua datreveno de la ekzisto de nia societo kun partopreno de f-ino Lidja Zamenhof el Warszawa kaj s-o Dubiński el Białystok. La prezidanto dro M. Perelman faris malferman paroladon, post kiu eksonis la pola nacia himno. S-o S. Litwiński raportis pri la tutjara agado de la societo kaj alvokis la ĉeestantaron al plua agado. Poste salutis s-o Dubiński kiel reprezentanto de la białystoka esperanta societo kaj f-ino Markevič, kiu tralegis publike la salutdepeŝojn senditajn de s-o Sapiro el Białystok kaj s-o Feliks Zamenhof el Warszawa. Precipe bone impresis la prelego farita de f-ino Lidja Zamenhof oollingve je la temo: „Sur la ruinoj de laabela turo“ kaj finita per provleciono laŭ Ce-metodo, kiu sukcesis interesi la publikon kaj elvoki bonhumoron en la salono. Ektondris la esperanta himno kaj komenciĝis la kantmuzika parto, kiu konsistis el deklamoj kaj kantoj akompanitaj de bona orkestro. Partoprenis f-inoj Łucka kaj Zuberka, kiuj rikoltis multajn aplaudojn. Tiu ĉi festkunveno e-las multnombro vizitita kaj postlasis neforgeseblan impreson en nia urbo.

SOSNOWIEC. Por prepari propagandan laboron antaŭ la universala kongreso en Kraków la lokaj esperantistoj kune kun Esperanta Delegitaro de Zagłębie estas organizintaj esperantistan klubon. Depost du monatoj; EDZ gvidas du kursojn de Esp. laŭ konversacia metodo por 30 partoprenantoj. — Instruistaro en Sosnowiec ĉiam pli interesiĝas pri Esperanto kaj lernas ĝin. Lerneja inspektoro por Będzin'a distrikto, s-o Luchowiec permesis aranĝi la kursojn en ejoj de popollernejoj. En Piaski la junularo aranĝis la preleĝon s. t. Kial ni lernas Esperanton? Aŭdigis ĝin sekretario de EDZ s-o B. Czechowski.

TARNOWSKIE GORY. La 14. 12. 30. okazis poŝtkartvespero de ĉi-tiea Rondo Esperantista „Konkordo“ fondita antaŭ unu jaro. Alvenis 30 salutoj el 16 landoj. La tempon de la amika kunesto plenigis Esp-kantoj kaj laŭtlegataj sciindaĵoj pri Nia Majstro kaj Lia verko. La bonsukcesa vespero finiĝis per komuna fotografiĝo.

23-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kraków 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1931.

BULTENO N-o 4.

20 JANUARO 1931.

Adreso por leteroj: Universala Kongreso de Esperanto, Kraków, Lubicz 34.

Loka Kongresa Komitato. Estas elektitaj gvidantoj de ĉiuj sekcioj de LKK, kaj jen: Propagand-gazetara s-o Józef Toczyski, loĝeja — s-ino Julja Neuberger, ekskurso — s-o Dro Tadeusz Piotrowski, amuzo — s-o Jerzy Sowiński, de kursgvidado — s-o Dro Leopold Dreher.

Aliĝoj. Jam aliĝis 63 personoj, sed pro absoluta manko de loko en la nuna n-ro iliajn nomojn ni konatigos en la februara n-ro de P. E.

Pasportoj. Ministerio de ekstero decidis per reskripto N-ro P. VI. 93/31, ke ĉiuj partoprenantoj de la kongreso ricevos senpagajn vizojn, montrante nur siajn aliĝkartojn.

Propagando per radio. Por konigi preparojn al la kongreso antaŭ la eksterlanda samideano estas disaŭditaj kelkaj prelegoj, pri kiuj ni informos pli detale ĝustatempe.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO.

POLA TERITORIO, Cefdelegito: J. Sapiro, Lipowa 33, Białystok.
Konto ĉe PKO No 60.047.

OFICIALA BULTENO N-o 21.

PREMIOJ POR FRUPAGINTOJ. Ni memorigas, ke premion por frupago ricevos ĉiu membro kies kotizo por 1931 atingos la Teritorian Oficejon de UEA en Białystok ĝis plej malfrue la 31. I. n. j. Intertempe aliĝintaj membroj jam ricevis la elektitajn de ili premiojn. Membroj, aliĝintaj sed ne iudikintaj, kiun premion ili elektis, bonvolu rapide informi la Cefdelegiton pri la dezirata premio. Se ĝis 1-a de februaro ne venos tiu informo, ili ricevos la premion laŭ elekto de la Cefdelegito.

La kotizoj estas pagotaj al la loka Delegito aŭ — se ne estas — rekte al la Cefdelegito en Białystok.



PREMIOJ POR SUBTENANTOJ. Laŭpromese ni publikigas ĉisube la plenan liston de premioj por Subtenanto: I. Bibliografio de Internacia Lingvo (560 grandformataj paĝoj). II. Belga Antologio. Parto Franca kaj Flandra (2 volumoj kune 600 pĝ.). Krom tio: Fruitier: Kompleta gramatiko kaj vortfarado de Esperanto. III. Fabiola (fama romano de kardinalo Wieseman, 436 pĝ. kun bildoj). IV. La Sankta Biblio en Esperanto. Eldono en imitadoj pergamena, silka papero tre maldika, orumita. Krom tio: „La Evangelio en multaj lingvoj“, entenanta 500 specimenojn de lingvoj kaj skriboj, en kiuj eldoniĝis la Biblio. V. Dro Edm. Privat. Esprimo de Sentoj en Esperanto. Bindita, sur luksa papero, kun aŭtora subskribo. VI. Dro Edm. Privat. Historio de la lingvo Esperanto. Du volumoj lukse binditaj, kun subskribo de la verkinto. VII. Julio Baghy. Verkaro. 5 volumoj (preskaŭ 900 pĝ.). VIII. Henrik Ibsen: Imperiestro kaj Galileano. Krom tio: Kompleta gramatiko kaj vortfarado de Esperanto. IX. Hendrik Koscience: La Leono de Flandrujo. Krom tio: Flandra parto de Belga Antologio. X. Tuta kolekto de ĉiuj premioj por frupago (12 libroj, ĉ. 1000 pĝ.). XI. Per balono al la poluso. La fama libro pri Andrée kaj liaj kamaradoj. Kun multaj bildoj.

Ni invitas ĉiujn samideanojn, kiuj havas financan eblecon, ke ili bonvolu aliĝi al UEA kiel Subtenantoj. Ili helpos nian Asocion dum la nuna kriza tempo kaj samtempe ili pliriĉigos sian Bibliotekon per belaj Esperantaj libroj.

La kotizo de Subtenanto estas 45 Zl.

NOVA KATEGORIO DE MEMBROJ. Por ebligi ankaŭ al malriĉaj samideanoj la aliĝon al U. E. A. kaj uzon de ĝiaj servoj estas kreita nova kategorio de membroj — „Helpmembro“. Por la malalta jarkotizo de 3 Zl. la Helpmembro ricevas la membrokarton kun servokuponoj, sed ne la Jarlibron. La Helpmembroj ricevas ankaŭ senpagan libropremion laŭ speciala listo. La Helpmembroj ne rajtas ricevi premion por frupago.

Detalajn informojn donas la lokaj Delegitoj aŭ la Ĉefdelegito.

STATO DE UEA EN POLUJO. Ĝis la 1-a de Januaro n. j. pagis sian kotizon por la jaro 1931/76 membroj (3 DM, 4 MS, 42 MA kaj 26 M). Krom tio pagis la kotizon 1 Esp. Entrepreno. Pro la okazonta en nia lando Universala Kongreso necesas, ke ĉiuj Esperantistoj estu organizitaj. Multnombraj aliĝoj al UEA montros, ke la ĝesamsideanoj en Polujo komprenas la gravecon de organiziĝo. Ĉiu do rapidu aliĝi.

NOVAJ DELEGITOJ. Plezure ni notas la jenajn novajn Delegitojn:

CHORZÓW. (Ŝlask). D. Konstanty Czaja, maŝinisto, ul. Sobieskiego 3, —
VD. Tomasz Bywaletz, inspektoro, ul. Szkolna 20.

RUDA. (Ŝlask). D. Abraham Rozenes, komercisto, Biskupicka 3.

WŁODZIMIERZ. D. Erasto Krajewski, florkulturisto, Mała Browarna 6.
Białystok, la 1. I. 1931. J. Szapiro, Ĉefdelegito de UEA.

FAVORA ABONPREZO 5 ZLOTJ

por „Pola Esperantisto“, la oficiala organo de la XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto kaj sola Esperanto-gazeto en Polujo, estas konsentata al ĉiu Membro-Abonanto kaj Subtenanto de U. E. A.

Por ĝui tiun favoron pagu tuj vian kotizon de UEA por 1931 kune kun la rabatita abonprezo 5 Zl. (anstataŭ 8 Zl.) al la Delegito de UEA en via loko aŭ — se ne estas — rekte al

J. Szapiro, Ĉefdelegito de UEA, Lipowa 33, Białystok.

Konto ĉe PKO No 60.047.

ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ.

Komuniko Nr. 2.

Ĝis la 15-a de januaro 1930 anonciĝis por la Adreslibro: 2500 societaj membroj plus pli ol 700 izolaj, kune pli ol 3200 esperantistoj. Antaŭabonis la libron ĝis la sama dato 600 personoj. Dank' al financa garantio de „Pola Esperanta Delegitaro“ la ĝustatempa apero de l' libro estas tute certigita. La preparo por presado okazos en januaro, la presigo en februaro, la dissendado de la libro en marto 1931. Ĉiuj alsenditaj adresoj estos presataj senpage; la libro mem kostas antaŭabone 2.— zl, post apero 3.— zl. Eksterlande la samo en sv. frankoj. Por apartaj anonckondiĉoj — mendu detalan prospekton, dissendatan al ĉiuj interesatoj senpage.

La libro enhavos — por pligrandigi ĝian valoron — krom la Adresaro ankaŭ „Praktikan Informilon Priesperantan“ kun indikoj por memlernatoj, adresaro de ĉiuj esp. gazetoj, organizajoj, bibliografio ktp.

Esperantaj societoj, grupoj kaj kursgvidantoj, kiuj ne ankoraŭ faris tion, estas insiste petataj alsendi kune kun la listo de siaj membroj ankau la adreson de sia sidejo, kunvenloko kts. kun mallonga historia skizo pri sia ĝisnuna agado — por senpaga presigo en la „Adreslibro“. Kiu alsendos la aligilon post la 1. II. 1931, estos presata en la „Aldono al la Adreslibro“.

Ĉiu korespondajo kaj mensendoj estu direktataj senpere al la adreso:

REDAKCIO DE LA ADRESLIBRO DE POLLANDAJ ESPERANTISTOJ
WARSZAWA, M. O. Czerniaków
 ul. Zacisza 2. m. Jana Zawady
 (Konto PKO. 20845).

GEKOLEGOJ INSTRUISTAJ!

Mi turnas min al ĉiuj, kiuj ŝatas nian „Kunlaborado-n“ kun IALA. Fakte tiu laboro ĉiurilate taŭgas por sukcesigi niajn celojn inter la gekolegoj kaj en la lernejoj. Sed ĝi estos vana, ĝi eĉ povos fariĝi iluzia, se ĝi ne helpas plifortigi nian fakan asocion „TAGE“ (Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj). Ni bezonas tian organizacion. Aligi al ĝi estas nepra postulo, ĉar nur tiam la oficiala TAGE-gazeto, nia „IPR“, kiun ricevas ĉiu membro de TAGE, povas ekzisti. Ĝi ne plu povas ekzisti, se ĝia abonantaro ne kreskas. Ni bezonas abonantaron de 1.200 membroj, por ke la gazeta budĝeto estu en ordo. Nuntempe ni pro la tro malalta kotizo kaj pro la — sekve de la nesufiĉe granda abonantaro — ankoraŭ tro alta prezo de la gazeto ĉiam havos deficiton.

Permesu, ke mi atentigu vin pri via devo kaj bonvolu sendi al mi deklaron pri aliĝo al TAGE kiel eble plej baldaŭ. La „Laborkomisiono por TAGE“ komisiis min, peti vian helpon. Mi esperas, ke vi plenumos mian peton kaj petas vin alsendi la deklaron de via aliĝo rekte al mi.

Martba Moelke

sekretariino de „Kunlaborado“

Brandenburgische Str. 5

Berlin — Südende (Germanujo)

NB. Bonvolu sendi vian deklaron laŭ jena skemo:

Mi aliĝas al TAGE kaj estas preta, pagi ĝis la la kotizon de 1 dolaro por 1 jaro.

nomo

detala adreso

LAKMISHVAR SINHA EN POLUJO.

La 18-an de marto k. j. alvenas Polujon la famkonata, hinda samideano Lakmishvar Sinha por fari rondvojaĝon tra la tuta lando. Esperantaj societoj, U. E. A.-delegitoj, Samideanoj el tuta Polujo!!! Uzu la unikan okazon por fari bonan poresperantan propagandon. Interrilatiĝu kun Akademia Esp. Rondo, Warszawa, Nowy Świat 21, kiu aranĝas la prelegojn de la Hinduo.

La prezoj de la prelegoj estas tre mallaltaj ĉirkaŭ 50 zł., tiel ke la Rondo kovras ĉiujn elspezojn por vojaĝkostoj kaj vivteno de la preleganto.

S-ano Sinha, kiu estas brila paroladisto prelegos je ĉi-nomitaj temoj.

1). Hindujo antaŭe kaj nun.

2). Oriento kaj Okcidento.

3). Mahatma Gandhi kaj Rabindranath Tagore.

4). Hindaj moroj kaj kutimoj.

Petu senpagajn perspektivojn kaj precizan planon de la vojaĝo.

RESPONDO.

Al s-oj B. Cz. el Sosnowiec, K. C. el Warszawa, M. S. Bydgoszcz interesiĝantaj pri mia artikolo „Jom pri la politiko“ el la pasintmonata numero de P. E. mi respondas, ke mi esprimis tie mian personecan opinion, kiu neniel tuŝas aŭ ŝuldigas nian revuon.

O. Bujwid.

NE FORGESU RENOVIGI LA ABONON POR J. 1931!

Paĝu la abonon je nia konto PKO 406.660.

Abonu mem kaj varbu novajn abonantojn por la sola esperanta gazeto en Pollando!

La granda, oficiala libro pri la tragedia, nordpolusa ekspedicio de la svedo Andrée en la jaro 1897, kies restaĵojn oni trovis 1930 en la polusa maro —

„PER BALONO AL LA POLUSO“

estas la plej atentinda verko ĝis nun aperinta en Esperanto. Enhavas la taglibrojn de Andrée mem kaj liaj kamaradoj. 416 paĝoj. 115 bildoj. Prezo: broŝ. sved. kr. 9.—, bind. 11.50; afranko 0.50.

Eldona Societo Esperanto, Stockholm 1. Svedujo. Poŝtĉeka konto 578. Poloj aĉetu ĝin ĉe Admin. de „Pola Esperantisto“; prezo zl. 23.60 kun afranko Konto PKO. 406.660.

Lublin (Polujo) str. Konopnicka No 8 m. 7. S-ro Czesław Pruski, Delegito de U. E. A. dez. kor. per L. K. P. I. kun rumanaj ĝesamideanoj, partoprenontaj fraŭloj, vizitontaj la XXIII-an en Kraków.

Lublin (Polujo) str. Narutowicza No 14 m. 3. S-ro Marjan Klimowicz dez. kor. per P. K. bfl. kun junuloj de ĉiuj landoj.

Lublin (Polujo) str. Tatarska No 2. S-ro Ado Zorkraut dez. kor. kun ge-fraŭloj, vizitontaj la XXIII-an en Kraków.

Lublin (Polujo). Filio de „Pola Esp. Asocio“ str. Krak. Przedm. No 60. cuk. „Warszawska“ pelas ĉiujn trapasantajn ĝesamideanojn viziti la kunvenejon. (marde de 8—10 vesp.)

Piaski k. Lublina (Polujo) dom vlasny. S-ro Florentyn Kotliński. Del. de UEA., direktoro de lernejo dez. koresp. kun instruistoj ĉiulandaj.

Lublin (Polujo) str. Jezuicka No 14. F-ino Cesia Rezniuk, 20-jara volonte korespondas kun eksterlandaj samideanoj per L. kaj Pl. Temo laŭvola k. ĉ. l.

Lublin (Polujo) str. Garbarska No 16. Du fratinoj f-inoj Helena kaj Justyna Wajnryb dez. koresp. per L. kaj P. K. kun ĝesamideanoj de ĉiuj landoj

Lublin (Polujo) str. 1-go Maja No 51 m. 6. S-ro Konstanty Bienkowski, stacidomestro dez. koresp. kun fervojistoj ĉiulandaj precipe kun partoprenontaj de XXIII-a en Kraków.

Libreja Fakoj de „Pola Esperantisto“

Kraków, ul. Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

REKOMENDAS :

Albanio — Gvidlibro	0.60
Albumo de Kraków (34 fotoj)	0.80
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15.00
Ama stelaro	1.10
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1.25
Avsejenko — Fraŭlino Suzano	2.00
Baghy — Viktimoj	9.60
Balucki — Kuzeto. Komedio en trad. de S. Grenkamp	0.60
Baudouin — La arto de memdisciplino: Psikagogio	1.30
Białystok — Gvidlibro tra urbo de nia Majstro	0.60
Blicher — Taglibro de vilaĝpedelo. Rakonto	1.20
Bonnels — Solandro	2.20
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1.00
— La apliko de radioj ultraviolaj al sterilizo de akvo	0.35
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1.20
Bultais — Malriĉa en spirito. Dramo orig. en E.	1.40
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0.60
Butler — Himnaro Esperanta	3.00
— Kantaro Esperanta	3.00
Campe — Robinsono Kruso	7.00
Cart i Borel — Esperanto w 10 lekejach	1.30
Conscience — La leono de Flandrujo	11.75
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1.25
— Esperantyzm. Wyd. II.	3.00
Czechowski — Podróż po świecie dostępna dla każdego	0.50
Cefeĉ slosilo esper. (malgranda formato)	0.50
Dobrzański — Al mokantoj	0.45
Dreyfus — La vangfrapo	1.00
Fredro — Consilium facultatis. Komed. trad. Ant. Grabowski	1.60
Fruictier — Kompl. Gramatiko kaj vortfarado de Esper.	8.50

Gemoj de la hungara popolmuziko	3.20
Grabowski Ant. — Nova Antologio	1.60
Grenkamp-Kornfeld — Krijoj de l'koro. Poeziaĵoj	0.50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0.75
— Kompletny samouczek jęz. Esperanto	1.25
Gryff — W sprawie nauki języków obcych	0.50
Herben — Malriĉa knabo, kiu gloriĝis	4.50
Hiller — Ho, tiuj fremduloj, opereto	1.40
Ibsen — Imperiestro kaj Galileano	12.60
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk , eldon. de la P. E. D. Kraków	1.50
Insignoj esper. (steloj) po 1.10, 1.20, 1.30, 1.40, 1.50, 1.70, 2.10.	
Insignoj esper. por poloj	2.50
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1928	5.00
Jarkolekto de „Pola Esperantisto“ 1929	6.00
Jaumotte — Belga Antologio, franca parto	10.00
Jung — La alta kanto de la amo	1.80
Kaplan — Akordoj esperantaj	0.80
Karlinthy — Norda vento; novelkolekto	1.30
Kenelm Robinson — Se grenereto	13.00
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1.00
Kraków — Urbo de Jubilea Kongreso 1912	0.80
Kriss — Melodoj de l' nokto. Poeziaĵoj	1.00
Lagerlöf — La junulino el Stormyr	3.75
Lange — Libro de profetoj, ses poemoj; trad. Ant. Grabowski	1.50
Lessing — Minna de Barnhelm	4.30
Malgranda terbiblio	2.00
Mickiewicz — Improvizacio de Konrad	0.50
Multatuli — Historio de Saidiach kaj Adinda; eld. Liem Tjong, Hie Semarang — Java	1.85
Oberrotman kaj Jung — La lastaj tagoj de Dro Zamenhof	2.60
Per balono al Poluso; la libro pri Andrée kaj liaj kamaradoj	22.50
Polaj Kristnaskaj Kantoj	0.25
Poŝtkartoj (kun moto de Żeromski) 10 pecoj	0.50
Reymont — En fumejo de l' opio	1.20
Sinha — Bengalaj fabeloj	2.50
Słowacki — La patro de pestuloj el El-Arish, trad. Ant. Grabowski	1.40
Staff — Aŭtunaj agordoj	1.00
Sapiro — Babiladoj de bonhumora Zamenhofano	1.00
Sismanow — Ĉu estas ebla kaj necesa internacia helpilingvo	1.00
Slosilo esper. en pola lingvo	0.60
Tatroj kaj Zakopane	0.50
Tichawski — „La Mondlingvo“, podr. Esp.	5.00
Trochimowski — Kwestia języka międzynarodowego 10 ekz.	1.00
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta; wyd. III.	1.25
— Wyższy kurs	2.00
Vermuyten — Belga Antologio, franca parto	10.00
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2.40
Zamenhof, D-o Leono — Mia liro	1.10
Zawada — Pełny podstawowy słownik j. Esp. (esp-pol.)	4.00
La verkoj de Zamenhof:	
Fundamenta Krestomatio	5.60
Fundamento de Esper. (5-lingva)	2.30
Lingvaj Respondoj	2.80
Proverbaro Esperanta	2.70
Andersen — Fabeloj I. kaj II. parto po	4.40
Goethe — Ifigenio en Taurido	3.30
Gogol — La Revizoro	3.30
Heine — La Rabeno de Baharaĥ. La Gimnazio	2.30
Molière — Georgo Daudin	1.75
Orzeszko — Marta	5.50
Schiller — La Rabistoj	3.30
Shakespeare — Hamleto	2.75

Nur antaŭpago. — Por sendkostoj aldonu 10%.

Por rekomendita sendaĵo plu 0.50 zł. La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.